

informilo por interlingvistoj



Eldonas Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)

18-a jaro (tria serio)

ISSN 1385-2191

n-ro 68 (1/2009)

Enhavo

1	Dujara observado de malgrandaj lingvoj en interreto (<i>Jéromo Vaše</i>).....	2
2	El universitatoj	4
2.1	Pri Esperanto kaj interlingvistiko en Humboldt-Universitato (Berlin) Kelkaj personaj spertoj (<i>Detlev Blanke</i>)	4
2.2	Nova jardeko de Interlingvistikaj Studoj en UAM (<i>Ilona Koutny</i>)	8
2.3	Marc Okrand gastprelegis en la Universitato de Leipzig (<i>Sabine Fiedler</i>)	9
2.4	Kvar interlingvistoj – kvar novaj universitataj profesoroj	10
2.4.1	Sabine Fiedler.....	10
	Publikigaĵoj	11
2.4.2	Kimura Goro Christoph.....	14
	Publikigaĵoj	14
2.4.3	Velimir Piškorec.....	15
2.4.4	Wim Jansen	17
2.5	Kursoj	17
2.5.1	Kursoj en Stokholmo (<i>Sonja kaj Hokan Lundberg</i>).....	17
2.5.2	En germanaj universitatoj	18
2.6.	Disertacioj kaj aliaj altlernejaj laboraĵoj	18
2.6.1	Bakalaŭraj kaj magistrasaj disertacioj	18
2.6.2.	Doktorigasaj disertacioj.....	19
3	Novaj eldonaĵoj	19
3.1	Katalogo II de la kolekto Károly Fajsz.....	19
3.2	Poŝvortaroj el Poznań.....	19
3.3	Aktoj de Esperantologiaj Konferencoj	20
3.4	Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto.....	20
3.5	Libroj pri la historio de Universala Esperanto-Asocio	21
3.6	Planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj – 15-a eldono de la Aktoj de GIL	22
4	Language Problems & Language Planning (LPLP)	23
5	Pri Esperanto en la Bibliografio de MLA.....	25
6	Bernard Golden forpasis	26
7	Personaj bibliografioj	27
7.1	Kompletigoj al Claude Piron	27
7.2	Michel Duc Goninaz	27
7.3	Ulrich Lins.....	31
8	Diversaĵoj.....	40

1 Dujara observado de malgrandaj lingvoj en interreto

Jeromo Vaŝe

Dum la jaroj 2006 kaj 2007 „abako“ [Abako 2007] esploris la kvanton de retpaĝoj en Esperanto kaj en kvin aliaj lingvoj. Tiu privata projekteto celis taksu la viglecon de tiuj lingvoj en interreto kaj eventuale ilian tratempan evoluon. Aperis raporto en la reta gazeto „Libera folio“ [Vaŝe 2007]. La nuna artikolo emfazas kelkajn metodajn problemojn kaj perspektivojn.

Lingvoj en interreto

Pri kvanto de dokumentoj en interreto taksoj ne multas. Se ili entute ekzistas, ili tre malprecizas. Malofte ili provas distingi inter lingvoj.

Unu el la plej seriozaj esploroj, farita en jaro 2000, taksis la nombron de esperantaj vortoj en interreto je 26.795.000 [Grefenstette 2000]. La lingvo internacia tiel rangis proksime al lingvoj latina, eŭska, latva, litova.

Limoj al esplorado

Ĉiuj similaj enketoj dependas je interretaj serĉiloj. Tio signifas plurajn limigojn, interalie ĉar:

- Serĉiloj esploras la tuteran teksaĵon, ignorante plurajn aliajn partojn de interreto, ekzemple retmesaĝojn, diskutgrupojn...
- Ene de la tuta teksaĵo serĉiloj ignoras la „nevideblan interreton“, ekzemple datumbazojn, lokajn retejojn de firmaoj...
- Serĉiloj liveras nefidindajn nombrojn de respondoj probable pro reklamcela troigo [Veronis 2005]
- Eĉ elektante kelkajn tipajn, tre oftajn vortojn de ĉiu lingvo por serĉo, egalan trakton de ĉiuj oni ne certigas.

Kompensante la limigojn

La baza esplormetodo konsistis en serĉo de tre oftaj vortoj el ĉiu lingvo: "tudi laĥo" por la slovena, "eta dira izan" por la eŭska, "mae hefyd" por la kimra, "atque cum quod" por latino, "biex fuq" por la malta. Normale ĉiu kelklinia teksto de la respektiva lingvo enhavas tiujn vortojn, tiel ke la respondnombro de serĉiloj teorie montras la nombron de paĝoj en la lingvo. Nefidindecon de respondoj „Abako“ kontraŭbatalis per du rimedoj: samtempa pridemandado de tri retserĉiloj, kaj perioda, ĉiumonata demandado. Tiu metodo nur parte sukcesis: la uzo de *altavisto*, *guglo* kaj *jahuo* liveris mezumajn nombrojn kiuj monate tro abrupte variis, ol ke ili restus kredindaj. Probable necesus pli granda nombro de serĉiloj.

Komparo inter pluraj lingvoj tamen ebligis konkludojn, ĉar iliaj relativaj gravecoj restis proksimume konstantaj. Ekzemple de aprilo al majo 2008 la mezuma nombro de respondoj por Esperanto sufiĉe abrupte malkreskis de 1.985.667 al 1.716.333, kaj por la kimra lingvo ĝi paralele evoluis de 925.667 al 807.333, tiel ke la relativa grandado de ĉiu restas sufiĉe konstanta.

La evidenta konkludo de la esploro estas mezuro de la relativa vigleco de ĉiu lingvo en interreta medio. Malrekta, pli malfacila konkludo temas pri nombro de parolantoj. Ĝi estas interesa konkludo precipe pri lingvoj, kies uzateco estas nekonata, kiel okazas pri Esperanto kaj latino.

Rezultoj

La nombradoj prezentitaj en „Libera folio“ montris iom diversajn rilatojn inter nombroj de retpaĝoj kaj nombroj de parolantoj de naciaj lingvoj. Ekzistus 0,51 parolanto por 1 retpaĝo en la slovena lingvo, kaj 1,25 parolantoj por 1 retpaĝo en la malta lingvo. Samaj proporcioj rilate al la nombro de retpaĝoj en Esperanto supozigus inter 940.000 kaj 2.303.000 parolantoj, kaj pli meza valoro proksima al la proporcioj de provincaj lingvoj, kiaj la eŭska aŭ la kimra, supozigas iomete pli ol unu miliono da Esperanto-parolantoj.

	mezuma nombro de retpaĝoj 2006-2007	parolantaro laŭ ethnologue.com	parolantoj / paĝo	supozebla parolantaro
slovena	3868750	1984775	0,51	
esperanto	1842389		0,57	1044695
kimra	895361	536258	0,60	
eŭska	1098986	588108	0,54	
latino	523000		0,57	296558
malta	297560	371900	1,25	

Intertempe, en decembro 2007a, publikiĝis diversloke en interreto rezultoj de enketo far esplorfirmao gfk [ekzemple: Zisman 2008]. Ĝi taksas la proporcion de retumantoj en diversaj eŭropaj ŝtatoj. Ĝi ne enketis aparte pri la provincoj Eŭskio aŭ Kimrio, sed pri Slovenio kaj Malto ĝi anoncas respektive 61 kaj 25 elcentojn da retumantoj en la loĝantaro. Tiuj nombroj surprize akordas, montrante ekziston de 0,31 retumantoj por 1 retpaĝo. Tio ebligas alian kalkulon, laŭ kiu la nombro de esperantistaj retumantoj estus supera al 500.000.

	mezuma nombro de retpaĝoj 2006-2007	parolantaro laŭ ethnologue.com	proporcio da retumantoj	retumantaro	retumantoj / paĝo	supozebla retumantaro
slovena	3868750	1984775	61%	1210713	0,31	
esperanto	1842389				0,31	571141
malta	297560	371900	25%	92975	0,31	

Perspektivo

Ĉu indus daŭrigi aŭ rekomenci Abakon kun plibonigita metodo? Tio utilis, se oni aŭtomatigus ĝin: programo povus kolekti sufiĉe ofte la respondojn pri samaj lingvoj el kvino aŭ deko da serĉiloj, kaj kalkuli la mezumon. Ankaŭ la sortimento de esplorataj lingvoj kaj la serĉesprimoj povus esti plibonigataj. Tia grandigo de la projekto tamen postulus teaman laboron kaj iom da rimedoj.

Sed pli interese estus imagi paralelajn esplorojn, kiuj koncernus la samajn lingvojn, sed provus taksu aliajn specojn de kultura vigeleco:

- nombron de interretaj diskutgrupoj
- horojn da radiaj aŭ televidaj elsendoj
- kvanton da eldonitaj libroj
- kvanton da gazetoj
- nombron de kulturaj festivaloj...

Tiaj esploroj probable ne precizigus la netroveblan „nombron de esperantistoj“, ĉar kiel oni delonge rimarkigis, la difino mem de „esperantisto“ povas tre varii, pro tio ke ĝi estas lernata lingvo, kiun homoj scipovas en tre diversaj gradoj. Sed oni per tio povus desegni ian „mapon“, kiu montrus en kiuj komunikmedioj la lingvo viglas aŭ malviglas, kaj kompari tion kun la situacio de aliaj senteritoriaj lingvoj, de provincaj lingvoj aŭ de etŝtataj lingvoj. Oni tiel akirus iajn socio-sciencajn informojn pri la esperanta mondo.

Fontoj

[Abako 2007] <http://jvaŝe.free.fr/iloj/abako.htm>

[Grefenstette 2000] Estimation of english and non-english language use on the www / Gregory Grefenstette, Julien Nioche. - Proceedings of riao'2000, Parize, 2000-04-12 ĝis14, p 237a-246a. - <http://arxiv.org/abs/cs.cl/0006032>

[Vaŝe 2007] esperantistoj superas eŭskojn en reta aktiveco / Ĵ. Vaŝe. - libera folio, 2007-12-18. - <http://www.liberafolio.org/2007/abako>

[Veronis 2005] Web: google's counts faked? / Jean Véronis. - Technologies du langage, 2005-01-26. - <http://aixtal.blogspot.com/2005/01/web-googles-counts-faked.html>

[Zisman 2008] La scandinavie, championne d'europa d'internet / Marc Zisman. - qobuz, 2008-04-15. - <http://www.qobuz.com/info/spip.php?article10913>

(Ĵerom Vaŝe : jvaŝe@free.fr)

2 El universitatoj

2.1 Pri Esperanto kaj interlingvistiko en Humboldt-Universitato (Berlin) Kelkaj personaj spertoj

Detlev Blanke

1 Enkonduke

1.1 La unuan prelegociklon/kurson pri interlingvistiko en Humboldt-Universitato de (orienta) Berlino mi prezentis en la vintra semestro 1977/78 (“Planlingvoj en teorio kaj praktiko”). Ĝin la universitato proponis al mi post mia doktoriĝo (kompara lingvistiko, Dr.phil.) en 1976. La kurson frekventis ĉ. 30 studentoj. (Inter ili, cetere bonŝance por mi, estis studentino, kiu montriĝos la estonta lektorino de mia libro pri planlingvoj (“Internationale Plansprachen – Eine Einführung”, Berlin: Akademie-Verlag, 1985, 408 p., kun 2000-era sistema bibliografio).

Post mia habilitiĝo en 1985 (Dr.sc.phil.¹) kaj ricevo de la profesornivela instrurajto (“Facultas docendi” resp. [en FRG] “Venia legendi”) en 1988 la ministro pri Altlernejoj kaj Faklernejoj de GDR nomumis min “Honoraria Docente pri Interlingvistiko” ĉe Humboldt-Universitato. Ekde la vintra semestro 1988/89 – kun kelkaj malmultaj interrompoj – mi daŭre prelegadis en la sama universitato.

¹ Pro reformoj en la universitata medio de GDR meze de la 1970aj jaroj oni ŝanĝis “Dr. phil. habil.” al ”Dr. sc. phil.”. Sed temas pri la sama afero. Cetere, la “habilitacio”, do rajtigo profesornivele instrui en universitato (i.a. prelegi kaj ekspertizi disertaciojn) , samtempe kondiĉo por fariĝi universitata profesoro, estas iu mezeŭropa invento, en multaj landoj nekonata. Post la germana unuiĝo la universitato konfirmis miajn kvalifikojn kiel “samvalida al habilitacio”.

1.2 La lastan prelegociklon/kurson mi prezentis dum la vintra semestro 2006/2007. Kvankam mi daŭre estos je la dispoŝo de la universitato, mi tamen provizore finis mian prelegadon por ne tro tempe dependigi min de la ĉiusemajnaj universitataj devoj.

Tamen, iuj aktivecoj daŭras: Ekz. de 18-a ĝis 22-a de majo 2008 Humboldt-Universitato min sendis kiel gastdocenton al la Germanistika Sekcio de la Filologia Fakultato de la Universitato Zagrebo/Kroatio, sekvante la inviton de tiu universitato (iniciatita de la germanisto kaj interlingvisto, *prof. d-ro Velimir Piškorec*).

1.3 La prelegoj estis malfermaj por ĉiuj interesitaj studentoj, tio signifas, ke ili estis

(a) ofertataj en la kadro de Studium generale²,

(b) libervole elekteblaj (sed tiam devigaj) aparte por la studentoj de germana lingvistiko.

Pri la prelegoj anoncis la oficiala universitata program-libro (Vorlesungsverzeichnis) kaj krome – pli detale kun resumo – la “komentita program-libro” (Kommentiertes Vorlesungsverzeichnis) de la Instituto por Germana Lingvo kaj Lingvistiko, Filozofia Fakultato II de la universitato, al kiu mi formale apartenis, ĉar en tiu instituto la pozicio de lingvistiko estis aparte forta.

En la unuaj jaroj mi prezentis prelegojn dum la someraj kaj vintraj semestroj. Ekde 1999 la prelegojn mi prezentis nur dum la vintraj semestroj.

La prelegoj okazis unufoje semajne, po 90-minutaj. Kiel menciite supre mi ne prezentis kurson de Esperanto, sed kompreneble kelkaj prelegoj sufiĉe detale prezentis la strukturon, la evoluon, aplikosferojn kaj la lingvokomunumon de la ĉefa planlingvo laŭ (soci-)lingvistikaj vidpunktoj.

2 Miaj instruceloj

Mi konscie ne proponis Esperanto-kursojn, sed sciencajn prelegojn.

2.1 Celoj de la sciencaj prelegoj

- prezenti interlingvistikajn kaj esperantologiajn sciojn al studentoj, kiuj nur esceptokaze havis iujn sciojn pri la proponata temaro
- prezenti kaj diskutigi ĝenerallingvistikajn problemojn per la prismo de interlingvistiko/esperantologio, tiel subtenante la ĝenerale kaj specife lingvistikan klerigon de la studentoj (= heŭristika valoro de interlingvistiko)
- vekti intereson pri la fenomeno de planlingvoj ĝenerale kaj aparte – kompreneble – por Esperanto
- stimuli la studentojn verki studojn aŭ eĉ dimplomlaboraĵojn pri interlingvistikaj temoj.

2.2 Ĉu Esperanto-Kurso?

Eventuale estiĝintan intereson pri la lingvo Esperanto kaj la emo studi ĝin la studentoj povis kontentigi partoprenante Esperanto-kursojn en la urbo, resp. utiligante la ampleksajn eblojn de la interreto. Tamen foje, ligitaj al miaj prelegaroj, okazis semajnfinaj intensaj kursoj en la universitato, kiujn gvidis ne mi, sed – sub mia respondeco - aliaj spertaj esperantistoj el Berlin.

Altnivelaj kursoj pri Esperanto en universitataj kaj altlernejoj estas bonvenaj. Sed laŭ mi, sen almenaŭ enkonduka scienca bazo, ili ofte pendas en la aero.

² Tio estas komuna oferto de ĉiuj universitataj institutoj por ĉiuj studentoj, sendepende de la studfakoj. La celo estas proponi al la studentoj temojn ekster ilia studfako por plilarĝigi ilian scio-horizonton.

Do, laŭ mi la ĉefa celo de la universitataj aranĝoj ne nepre estu la bakado de novaj esperantistoj. Se oni provus fari tion sub niaj kondiĉoj, eventuale eĉ per altruda varbado, la rezulto ne nur estus negativa ĉe studentoj mem, sed ankaŭ la prestiĝo de aranĝoj kadre de universitatoj falus kaj ekestus danĝero, ke la universitato ne plu permesus tiajn aranĝojn.

La ĉefa valoro de interlingvistikaj aranĝoj estas, ke studentoj kontaktiĝas kun problemaro, antaŭe ofte komplete aŭ grandparte nekonata por ili.

Eble nur malmultaj studentoj vere interesiĝos tiom pri Esperanto, ke ili ŝatus lerni la lingvon. Ne gravas. Ili aŭdos ion sciindan pri problemaro, ofte prezentita eĉ inter lingvistoj ne nepre serioze. Ĉar multaj studentoj estos la intelektaj aktivuloj de la estonteco, ilia baza scio pri la interlingvistika problemaro ĝenerale, kaj pri Esperanto aparte, povas havi pozitivajn sekvojn (ekz. en eldonejoj, redakcioj de gazetoj, eĉ en la universitatoj mem ktp.). Mi tion jam spertis sufiĉe ofte.

Do, oni ne juĝu la universitatajn aktivecojn laŭ la kvanto de novaj adeptoj por Esperanto.

3 La studentoj

3.1 Kiam mi proponis prelegojn dum la somera kaj vintra semestroj, mian kurson averaĝe frekventis 12 – 20 studentoj, foje pli, foje eĉ malpli. La vintrosemestraj prelegoj ekde 1999 estis multe pli frekventataj. Dum la unuaj prelegoj (1. – 4.) venis inter 75 kaj 60 studentoj. Mi estis tute konfuzita pro la grandega, neniam antaŭe spertita, intereso kaj demandis, ĉu ili eventuale eraris en la prelegejo...

Kompreneble la kvanto reduktiĝis iom post iom kaj la kurso stabiliĝis tiel, ke ĝis la fino mi havis ĉ. 35- 40 studentojn. Sed entute per la unuopaj prelegoj dum unu semestro mi supozeble atingis pli ol 100 studentojn, almenaŭ peris al ili bazajn sciojn.

Eksterordinara estis la vintra semestro 1999/2000. Dum la unuaj kvar prelegoj venis ĉ. 140 studentoj el plej diversaj landoj. Ili devis uzi la fenestro-bretojn kiel sidlokojn. Ne ĉiuj venis de Humboldt-Universitato. Iuj venis de Libera Universitato³, de la Teknika Universitato kaj eĉ de Viadrina, (relative nova Universitato ĉe la germana/pola landlimo en Frankfurt/Odro). Ĉi-foje eĉ partoprenis rusa germanisto, kiu havis laborstipendion de Deutscher Bundestag (Germana Federacia Parlamento). Iuj venis laŭ EU-programoj (ekz. Erasmus/Sokrates). Kvankam tia amaso ne ripetigis, tamen ne malofte venis 80 – 100 studentoj.⁴

3.2 Dum tiuj preskaŭ 20 jaroj studentoj venis, krom el Germanio, el jenaj landoj: Aŭstrio, Britio, Ĉeĥio, Ĉinio, Francio, Georgio/Kartvelio, Grekio, Islando, Italio, Japanio, Kanado, Kroatio, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio, Ukrainio kaj Usono.

³ Pro la multjara politika disdivido de Berlino evoluis du universitataj pejzaĝoj. La tradicia estas la orientberlina Humboldt-Universitato (fondita en 1809). Teknika Universitato kaj Libera Universitato fondiĝis post 1945 en okcidenta Berlino.

⁴ De kie venis tiu saltego de la intereso ? Mi ne komplete sukcesis ekscii la kialojn. Laŭ miaj singardaj enketoj la intereso vekigis i.a. pro

a) informoj en amaskomunikiloj lige al la 84-a UK 1999, en Berlin,

b) la pli forta interesiĝo pri la lingva demando ene de Eŭropa Unio, relative forte stimulita per la diskutoj lige al la sinteno de la finna prezidento pri la allaso /neallaso de la germana lingvo en la EU-rilataj aranĝoj en Finnlando (la gazetaro raportis kaj lige al tio ja menciis fojfoje Esperanton).

c) eble ankaŭ helpis, ke la vorto Esperanto estis ligita al la muzikgrupo „Amikeco“, kiu siatempe sufiĉe furoris en Germanio, i.a. eldonis kompaktdiskon kun la nomo „Esperanto“

3.3 Ĉiam gravis por mi ekscii la studofakojn de la studentoj por konsideri – se eble – iliajn specifajn sciojn. La studfakoj estis precipe filologiaj (diversaj lingvoj, inter ili foje afrikaj), kompreneble germanistiko kaj ĝenerala lingvistiko.

Sed ankaŭ aperis jenaj fakoj: antropologio, bibliotekscienco, etnologio, filozofio, historio, informadiko, komunikado-scienco, kulturo-scienco, publicistiko, sociologio kaj teologio. Se la diversfakaj studentoj montris apartan intereson pri la ligoj inter interlingvistiko, Esperanto kaj iliaj fakoj, mi portis konvenan materialon aŭ atentigis pri specifa faka literaturo (ekz. aŭtomata tradukado kaj Eo k.s.) Mi rimarkis kun kontento, ke ĉiuj studentoj estis tre interesitaj, min foje interrompis per demandoj (tion mi ĉiam permesas), venis post la prelego kun demandoj kaj materialpetoj. Ekz. foje ĉinino tralaboris du ĵus aperintajn ĉinlingvajn librojn (traduko de „Historio de la Mondolingvo“ de Drezen kaj libro pri la historio de la ĉina Esperanto-movado). Alifoje turka studento aparte interesiĝis pri Solresol, ĉar li volis fariĝi filmreĝisoro kaj eluzi la ideon de la muzika lingvo.

3.4 Laŭbezone la studentoj ricevis atestilon pri partopreno (kiu havigis al ili oficialajn poentojn) aŭ por Erasmus-studentoj atestilon kun prijuĝo de aparta prezentaĵo (prelegeto, aŭ – kaj tio ĉefe – esejo). La esejoj ekz. temis pri la Esperanto-komunumo en la interreto (germanino), Basic English (du esejoj, usonanino kaj anglino), la rilatoj inter lingvaj rajtoj kaj Esperanto (japanino), pri Hugo Schuchardt (aŭstrino), motivoj por persekutoj de esperantistoj (aŭstro), la pazigrafio de György Kálmár (hungarino), sed ankaŭ lingvopolitiko de Quebec (usonano).

4 La prelegaro (kurso)

La kadra temo de la prelegaro foje estis “Enkonduko en interlingvistikon”, “Bazaj problemoj de interlingvistiko”, “Lingvoplanado kaj planlingvoj” aŭ “Internaciaj planlingvoj”. Sed montriĝis, ke tiuj temoj ne estis tro allogaj, verŝajne tro neniondiraj al la ĉefe sensciaj studentoj. Multe pli allogaj montriĝis „Esperanto: Kiel el projekto fariĝis vivanta lingvo“ aŭ “Serĉante universalan lingvon...”, “Universalaj lingvoj inter utopio kaj realo – la kazo de Esperanto” aŭ “Internacia komunikado per planlingvoj – sub aparta konsidero de Esperanto”.

La ĉefaj akcentoj de miaj prelegoj ĉiam iom ŝanĝiĝis. Foje mi substrekis lingvoplanajn aspektojn, foje lingvopolitikajn, foje donis pli da tempo al diversaj planlingvaj projektoj, foje malpli. Sed ĉiam mi prezentis la fenomenon de planlingvo, la tipologion kaj – kompreneble – Esperanton .

Jen tipa temaro de la kurso:

1. Unua renkontiĝo: malfermo de la kurso, teknikaj problemoj, konatiĝo kun la studentoj, prezento de la ĉefa celo de la prelegaro.
2. Enkonduko en la prelegaron (resuma anticipado de 3. – 16.)
3. Pri la fenomeno „planlingvo“: Aspektoj de lingvoplanado kaj lingvopolitiko
4. Survoje al universala lingvo: Projektoj kaj ilia tipologio
5. De projekto al lingvo: Etapoj de enkondukiĝo de planlingva projekto en la praktikon
6. Pri planlingva praktiko: Prezento de vidbendaj kaj sonbendaj materialoj pri Esperanto en la praktiko
7. Ekesto de Esperanto: Motivoj de Zamenhof, la Unua Libro, strukturprincipoj de la lingvo
8. Lingvistika karakterizo de Esperanto I (morfemaro, morfologio, gramatiko)
9. Lingvistika karakterizo de Esperanto II (vortfarado, karakterizo de la leksiko, evoluo-problemoj)
10. Simpla teksto: Traduko kaj lingvistika komento
11. Esperanto en la internacia praktiko: Superrigardo pri komunikaj sferoj
12. Esperanto kiel faklingvo (faka apliko kaj terminologiaj problemoj)

13. Esperanto kiel arta esprimilo (aparte: lingvo de literaturo)
14. La lingvo-komunumo de Esperanto I: Historio (inkl. persekutoj, laborista movado k.s)
15. La lingvo-komunumo de Esperanto II: Aktualaj strukturo kaj evoluproblemoj
16. Teoriaj kaj sciencorganizaj problemoj: Pri Esperantologio.

La unuaj du prelegoj montriĝis aparte gravaj. Ili informis la studentojn pri la celo kaj enhavo de la tuta kurso. Laŭ tio la aŭskultintoj povis elekti, ĉu la temaro entute interesas ilin aŭ ĉu ili eventuale miskomprenis la temon ktp. Do, iuj ne revenis, aliaj aldoniĝis.

Ĉiukaze ankaŭ tiuj, kiuj ne revenis pro manko de intereso aŭ aliaj kialoj (teknikaj, ĉar koliziis kun aliaj prelegoj k.s.) jam vole nevole estis ricevintaj enkondukon en la temaron.

5 Instru-subtenaj materialoj

En la germana lingvo ekzistas sufiĉe da sciencaj publikaĵoj pri interlingvistiko (vidu aldonajon I). Do la studentoj havis relative facilan eblon pluenprofundiĝi en la temojn.

Ĉiuj studentoj ricevis diversajn, aparte preparitajn materialojn, depende de la unuopaj prelegoj. Al tio apartenas baza bibliografio, diversaj skizoj, specimenoj de planlingvoj k.a. Mi kutime prelegas libere, do nur laŭ notoj kaj sen preparita teksto, prezentante multajn foliojn per tagluma projekciilo (retroprojekciilo, “overhead”). Por kutima kurso (16 semajnaj prelegoj po 90-minutaj) mi aplikis 500 – 800 foliojn. Mi fojfoje ankaŭ uzis vidbendojn kaj sonbendojn (vidu sub 4, prelego 6.).

6 Konklude

Ja gravas enkonduki interlingvistikajn temojn kaj Esperanto-kursojn en la mediojn de universitatoj kaj altlernejoj. La prelegantoj aŭ kursestroj prefere estu agnoskataj sciencistoj aŭ esperanto-parolantoj kun certa akademia kleriĝo.

Depende de la universitataj cirkonstantoj, de la “lobiuloj” ene kaj ekstere de la universitatoj kaj depende de la disponeblaj fakuloj, la ŝancoj enkonduki la fakojn estas malsamaj. Kadre de interlingvistikaj kursoj sendube Esperanto havos la merititan lokon, almenaŭ kiel lingvistika fenomeno. Tamen, ĉe Esperanto-kursoj ne ĉiam estas klare, kiom da sciencaj informoj donas la kursestro. Verŝajne necesus helpi la kursestrojn, konsideri tiun demandon. En la superrigardo de Germain Pirlot pri Eo en universitatoj por 2008 ĉe entute 68 kursoj nur en 15 kazoj menciitis interlingvistiko, planlingvoj, lingvo-politiko ks.

(vidu:<http://uea.org/agadoj/instruado/universitatoj.html> >).

2.2 Nova jardeko de Interlingvistikaj Studoj en UAM

La nuna septembra sesio (2008) de la Interlingvistikaj Studoj (en la Universitato Adam Mickiewicz, Poznano) estis escepta, ja kompletigis la unuaj 10 jaroj. La evento estis festata per internacia simpozio pri la *Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko* (18-19.09), kiun partoprenis 85 homoj el 22 landoj (programo kaj raporto: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/>)⁵. Ĉeestis ankaŭ la gvidantoj de la universitato kaj esprimis sian kontenton.

Parto de la tria grupo plenumis sian finan ekzamenon post 3-jara studado prezentante sian diplumlaboraĵon. Gratulojn al Marc Bavant (*La viva genro preter akordo. Interagoj de semantiko kun sintaksa rolmarkado*, Francio); Kirilo Brosch (*Vortfarado el la vidpunktoj de la*

⁵ Vidu la raporton en IpI 67 (4/08), p.28-29.

hindeŭropista lingvoscienco kaj de esperantologio, Germanio); Anne Jausions (*La plej oftaj malfacilaĵoj de franclingvaj Esperanto-parolantoj*, Francio) kaj Horst Vogt (*Komunikad-problemoj en la institucioj kaj en la membroŝtatoj de Eŭropa Unio – ĉu teorie kaj politike solveblaj?* Germanio).

Samtempe ekzameniĝis kaj ricevis instruistan diplomon de ILEI (kadre de la unujara komuna kurso de UAM kaj ILEI, organizita la unuan fojon en la studjaro 2007/08) 3 aliaj partoprenantoj: Jurate Bartaskiene (*Utiligo de poemetoj, rimaĵoj kaj kantoj en la lingvoinstruado*, Litovio); Witold Czerwinski (*Pedagogia vortareto Esperanta-pola*, Pollando) kaj Edit Slezákné Tar (*Instruado de akuzativo je diversaj niveloj*, Hungario). La laboraĵoj pri metodiko legeblas en www.edukado.net

Malgranda, sed entuziasma nova grupo komencis siajn studojn inter la 13-17a de septembro. Alvenis po du partoprenantoj el Brazilo, Irano, Kroatio kaj Usono, po unu el Francio, Grekio, Koreio kaj Ukrainio. Du afrikanoj, bedaŭrinde, ne ricevis polan vizon – ili nur virtuale povas sekvi la unuan semestron. La ĉeestantoj aŭskultis kursojn pri ĝenerala kaj esperanta fonetiko de *John Wells* (kun interesaj ekzemploj), pri esperanta kulturo de *Aleksander Melnikov* (kiu ĉerpis ankaŭ el sia nova libro pri vortludoj) kaj *Zbigniew Galor*, pri la unua periodo de esperanta literaturo de *Lidia Ligęza* kaj *Tomasz Chmielik*, pri komunikado de *Ilona Koutny* (kie la partoprenantoj nature povis sperti la diferencojn kaj similecojn en la metakomunikado). Pluraj prelegoj de la simpozio kaj de la sekva Arkones (semajnfina kultura renkontiĝo) kompletigis la kursojn.

(*Ilona Koutny*, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj)

2.3 Marc Okrand gastprelegis en la Universitato Leipzig

Sabine Fiedler

La 27-an de majo 2008 *Marc Okrand* prelegis en la Universitato Leipzig. Li estas la kreinto de la klingona lingvo konata el la filmserio *Star Trek*. Li parolis al inter 60 kaj 70 studentoj kaj lingvistoj pri la temo “Linguistics and Science Fiction: An Introduction to Klingon”. *Marc Okrand* doktoriĝis en 1977 en la University of California, Berkeley per studoj pri amerikaj indianaj lingvoj ĉe la okcidenta marbordo. Krom la klingona li kreis la lingvon de Atlantido por la filmo *Atlantis: The Lost Empire* de W. Disney. *Marc Okrand* skribis kelkajn librojn pri la klingona, i.a. “The Klingon Dictionary” (1985, prilaborita versio 1992), “The Klingon Way: A Warrior’s Guide” (1996), kiu estas komentita kolektaĵo de klingonaj proverboj, kaj “Klingon for the Galactic Traveler” (1997). En sia prelego li klarigis principojn de la kreado de la klingona, li rakontis pri la trejnado de la aktoroj en *Star Trek III, V kaj VI*, kaj ankaŭ pri la problemoj kaj taskoj kiujn kaŭzas la nuna uzo de la lingvo en la rondoj de *Star Trek*-entuziasmuloj kaj aliaj interesitaj en la tuta mondo.

La gastprelego estu okazo pripensi je kiu grado lingvoj kiel la klingona estas studobjekto de interlingvistiko. Dum la konferencoj de la germana interlingvistika societo *Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL)* lingvoj kreitaj por sciencfikciaj verkoj kaj lingvoj en sociaj utopioj ludis rolon de tempo al tempo. Oni komparu la artikolojn en la aktoj de la konferenco fare de *Cornelia Mannewitz* (1999, 2001, 2002) kaj de *Sven Siegmund* pri la *Tengwar* de J.R.R. Tolkien (2003) kaj ankaŭ la studon de *Cyril Brosch* pri la klingona el lingvotipologia vidpunkto (publikigita en *Grundlagen aus Kybernetik und Geisteswissenschaft* 02/2006).

Ni povas konstati kelkajn komunajn trajtojn de fikciaj lingvoj kaj planlingvoj. Tiuj estas i.a.

- (a) la komuna origino, t.e. la ekesto ĉe la skribotablo
- (b) la fakto, ke eĉ fikciaj lingvoj povas naski parolkomunumojn (kiel ĝuste la klingona montras kaj same *Sindarin* kaj *Quenya*, la lingvoj kreitaj de Tolkien) kaj ke dum uzado similaj ŝtupoj de aplikado montriĝas, kiel ekz. tradukado, origina literaturo, renkontiĝoj, norminstitutoj ĝis la ekzisto de denaskuloj
- (c) la fakto ke ankaŭ planlingvoj estas uzataj en sciencofikcio (ekz. Esperanto en la verkoj de *Harry Harrison*)
- (ĉ) parte identaj motivoj de la anoj de planlingvoj kaj fikciaj lingvoj (ekz. la deziro trovi rekonon, sociajn kontaktojn, la plezuro ludi per lingvaj rimedoj) aŭ
- (d) la fakto, ke aŭtoroj de fikciaj lingvoj ofte estis influitaj de planlingvoj aŭ rilatis al tiuj (ekz. *G. Orwell* ĉe la kreado de *Newspeak* estis inspirita de Interglossa kaj Basic English kaj *J. Swift* de la apriora projekto de *Wilkins*).

Aldone, ni ne subtaksu la studobjektno fikciaj lingvoj laŭkvante. La “Encyclopedia of Fictional and Fantastic Languages” eldonita de T. Conley kaj S. Cain (2006) priskribas pli ol 400 lingvojn. La homoj kiuj interesiĝas pri la temo kaj interŝanĝas opiniojn ekzemple en retaj komunumoj traktas ĉiujn konscie kreitajn lingvojn sen diferencigi.

Tamen ekzistas la grava diferenco de la motivoj de aŭtoroj. Se ni difinas planlingvon laŭ *Detlev Blanke* (1985: 53) en la senco de *Eugen Wüster* (1931) kiel ”lingvon, kiu estis konscie kreita de unuopa persono aŭ grupo da homoj laŭ certaj kriterioj por faciligi internacian komunikadon“ (mia traduko), ĉiu unuopa difina elemento gravas, ankaŭ tiu de „faciligo de internacia komunikado“. Ĝi certe havas konsekvencojn je la trajtoj de la lingvo. Dume ke por aŭtoroj de planlingvoj verŝajne fokusoj estas internacieco kaj lernofacileco, por fikciaj lingvoj verŝajne gravas estetikaj ecoj (ekz. ekzotikeco aŭ fremdeco).

Ni ne ekskludu la fikciajn lingvojn el niaj konsideroj. Finfine, ili estas fascinanta studobjekto kiu allogas ankaŭ multajn studentojn, kiel interalie la supre menciita kunveno kaj ties vivoplena diskuto montris. Mi mem traktas la temon en miaj interlingvistikaj prelegoj kaj seminarioj (vd. la programon en *IPI 2/2008*), sed substrekas, ke kaj kial temas pri ekskurso. Klara limigo necesas ankaŭ en la intereso de serioza prezentado de interlingvistiko por la ekstera publiko.

Blanke, Detlev (1985) *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie- Verlag
 Wüster, Eugen (1931) *Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik (Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung)*. Berlin: VDI

2.4 Kvar interlingvistoj – kvar novaj universitataj profesoroj

Dum la jaroj 2007 kaj 2008 kvar konataj interlingvistoj, profesiaj lingvistoj en siaj respektivaj universitatoj, estis nomumitaj profesoroj. Tio estas por ni bela okazo ne nur gratuli sed ankaŭ listigi iliajn interlingvistikajn verkojn.

2.4.1 Sabine Fiedler

La anglistino de la universitato Leipzig/Germanio, d-rino habil. Sabine Fiedler dum 2008 estis nomumita eksterplana profesorino. Okaze de ŝia habilitacio per verkego pri esperantaj frazeologiaĵoj ni jam prezentis la ampleksan liston de la publikaĵoj de Sabine Fiedler en *IPI 30* (3/1999), p.- 18-20 kaj en “Interlinguistische Informationen” (*IntI*) 30 (1/1999) p.10-12. Ni daŭrigas la liston jene:

Ed. , Eds., Hrsg., Red. Eldoninto, Redaktinto, Kompilinto
REC Recenzo

(1) Libroj

- (1999): Plansprache und Phraseologie. Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto). Frankfurt a. M. [usw.]: Lang, 444 p.
(2002): Esperanta frazeologio. Rotterdam: Universala Esperanto Asocio, 185 p.
(2003): Sprachspiele im Comic. Das Profil der deutschen Comic-Zeitschrift MOSAIK. Leipzig: Universitätsverlag, 283 p.
(2004): Ilustrita Frazeologio (kun desegnoj de Pavel Rak). Dobřichovice: KAVA-PECH, 135 p.
(2007): English Phraseology. A Coursebook. Tübingen: Narr, 198 p.

(Kun)eldonanto

- (2001) Fiedler, Sabine/Liu Haitao (Eld.): Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag/ Studoj pri Interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60jariĝo de Detlev Blanke. Dobřichovice (Prag): Kava Pech, 736 p.
(2006) Blanke, Detlev: Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen (editorita de Sabine Fiedler). Frankfurt/M. ktp.: Peter Lang, 405 p.

(2) Studoj

- (1999a): "Die neuere Fachsprache der Pädagogik im Englischen" (Artikel 164). En: Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft, Vol. 15: Fachsprachen. Ein internationales Handbuch zur Fachsprachenforschung und Terminologiewissenschaft. Languages for Special Purposes. An International Handbook of Special Languages and Terminology Research. Ed L. Hoffmann/ H. Kalverkämper / H.E. Wiegand. 2. Halbband, 1472-1477.
(1999b): "Zum Übersetzen von Phraseologismen in die Plansprache (dargestellt an literarischen Übersetzungen im Esperanto)". En: Sabban, Annette (Hrsg.): Phraseologie und Übersetzen. Phrasemata II, Bielefeld: Aisthesis, 59-80.
(1999c): "Phraseology in Planned Languages: An Empirical Study". En: Language Problems & Language Planning 2/1999, 175-187.
(1999d): "Zur Phraseologie im Enzyklopädischen Wörterbuch Esperanto-Deutsch von Eugen Wüster". En: Interlinguistische Informationen. Beiheft 5 (Interlinguistik und Lexikographie Beiträge der 8. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik), 33-39.
(2001a): "'Bela dam', ĉu al vi plaĉus, se akompanon mi kuraĝus? Zur Übersetzung von Goethes 'Faust' ins Esperanto". En: Interlinguistische Informationen Beiheft 6 (Sprachenpolitik in Europa) Beiträge der 9. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik), 128-145.
(2001b): "Naturalismus und Autonomismus in Plansprachen dargestellt am Beispiel der Phraseologie". En: Interlinguistische Informationen Beiheft 7 (Zur Struktur von Plansprachen. Beiträge der 10. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik), 75-92.
(2002): "On the main characteristics of Esperanto communication". En: Knapp, Karlfried/Meierkord, Christiane (Eds.): Lingua Franca Communication. Frankfurt a.M. [ktp.]: Lang, 53-86.
(2003a): "Merkmale computervermittelter Kommunikation (dargestellt am Beispiel einer Comic-Fan-Gemeinschaft)". En: Interlinguistische Informationen Beiheft 9 (Gesellschaft für Interlinguistik e.V. Berlin), 54-63.

- (2003b): "Eugen Wüster als Lexikograph: Rolle und Darstellungsweise von Phraseologie im Enzyklopädischen Wörterbuch Esperanto-Deutsch". En: Interlinguistische Informationen Beiheft 10 (Gesellschaft für Interlinguistik e.V. Berlin) (ProCom'98. Beiträge der Sektion "Terminologie-wissenschaft und Plansprachen" auf der Konferenz Professional Communication and Knowledge Transfer, Wien 1998), 86-99.
- (2003c): "Untersuchungen zur Phraseologie des Esperanto". En: Burger, Harald/Häcki-Buhofer, Annelies/Gréciano, Gertrud (Hrsg.): Flut von Texten - Vielfalt der Kulturen. Baltmannsweiler: Schneider-Verlag Hohengehren, 317-327.
- (2003d): "Die Esperanto-Übersetzung in Geschichte und Gegenwart". En: Kovtyk, Bogdan/Meiser, Gerhard/Solms, Hans-Joachim (Hrsg.): Geschichte der Übersetzung. Beiträge zur Geschichte der neuzeitlichen, mittelalterlichen und antiken Übersetzung. Berlin: Logos, 17-36.
- (2003e): "Pri frazeologio en la Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana de Eugen Wüster (1898-1977)". En: Hauptenthal, Reinhard (Eld.): Klara kaj Elasto. Fest-libro por la 80a naskiĝtago de Fernando de Diego. Edition Iltis, 171-182.
- (2004): "Das Sprichwort im Comic" (dargestellt am Beispiel der deutschen Comic-Zeitschrift MOSAIK). En: Földes, Csaba (Hrsg.): RES HUMANAЕ PROVERBIORUM ET SENTENTIARUM. Ad honorem Wolfgangi Mieder. Tübingen: Narr, 89-100.
- (2005a): "'English as a Lingua Franca' Zum Modell eines nichtmuttersprachlichen Englisch im Vergleich zum Esperanto". En: Interlinguistische Informationen. Beiheft 12, Berlin, 9-21.
- (2005b): "Phraseologismen in Comedy-Programmen: Die Harald-Schmidt-Show (2002-2003)". En: Heine, Antje/Hennig, Mathilde/Tschirner, Erwin (Hrsg.): Deutsch als Fremdsprache. Konturen und Perspektiven eines Faches. München: IUDICIUM, 181-198.
- (2005c): "Phraseology as a Learning Aim and Aid: Language Play in the Classroom". En: C. Cosme/C. Gouverneur/F. Meunir & M. Paquet (Eds.) Phraseology 2005. The many faces of phraseology. Louvain-la-Neuve, 133-135.
- (2006a): "Standardization and self-regulation in an international speech community: the case of Esperanto ". En: International Journal of the Sociology of Language 177 (2006), pp. 67-90.
- (2006b): "'Willkommen zurück!' - Zum Einfluss des Englischen auf die Phraseologie der deutschen Gegenwartssprache". En: Häcki-Buhofer, Annelies/Burger, Harald (Hrsg.): Phraseology in Motion I. Baltmannsweiler: Schneider-Verlag Hohengehren, 451-465.
- (2006c): "Nudpieda Gen - Hadashi no Gen in an International Speech Community". En: Berndt, Jaqueline/Richer, Steffi (Hrsg.): Reading Manga: Local and Global Perceptions of Japanese Comics. Leipzig: Universitätsverlag, 59-76.
- (2006d): „Detlev Blanke zum 65. Geburtstag“. En: Interlinguistische Informationen (IntI) 15, Nr. 59 (2/2006): 2-4.
- (2007a): „Ludische Kommunikation in und um Comics. Eine Analyse zur Sprache der Comic-Zeitschrift MOSAIK und ihrer Fans“. En: Klemm, Michael/Jakobs, Eva-Maria (Hrsg.): Das Vergnügen in und an den Medien. Frankfurt am Main: Lang, 177-197.
- (2007b): "Phraseology in Planned Languages (Art. 64)". En: Burger, Harald/Dobrovolskij, Dmitrij/Kühn, Peter/Norrick, Neal R. (eds.): Phraseologie/Phraseology. Ein internationales Handbuch der zeitgenössischen Forschung/ An International Handbook of Contemporary Research. Berlin/New York: de Gruyter. 779-788.
- (2007c): "Lingua-franca-Kommunikation: Eine vergleichende Studie Englisch – Esperanto". En: Blanke, Detlev/Scharnhorst, Jürgen (Hrsg.): Sprachenpolitik und Sprachkultur. Frankfurt am Main: Lang, p. 179-201.
- (2007d): „Phraseologismen in J.D. Salingers Roman Der Fänger im Roggen – Eine übersetzungswissenschaftliche Studie“. En: Mellado Blanco, Carmen (Hrsg.): Beiträge zur Phraseologie aus textueller Sicht. Hamburg: Dr. Kovač, 115-133.

- (2007e): "Alice's Adventures in Wonderland im Deutschen und Esperanto – ein inter- und intralingualer Übersetzungsvergleich". En: Interlinguistische Informationen Beiheft 14, Berlin, 27-50.
- (Presata): "Phraseology and Proper Names". En: Földes, Csaba (Ed.) *Phraseology Disciplinary and Interdisciplinary*. Tübingen: Narr.

(3) Raportoj kaj recenzoj

- (1993): REC pri Benoit Philippe „Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto“. En: *Sprachtypologie und Universalienforschung* Nr. 46 (1993) 2 S. 154-155.
- (1998). REC pri Michael Herriman/Barbara Burnaby (eds.) „Language Policies in English-Dominant Countries“. En: *Language Problems and Language Planning* 3/1998 S. 299-301.
- (2001a): „Europa der Sprachen“ in Innsbruck (35. Internationales Linguistisches Kolloquium, Innsbruck). En: *Interlinguistische Informationen (IntI)* 10, Nr. 40 (3/2001): 12-13.
- (2001b): „Internationaler Phraseologie-Workshop“ (Workshop „Phraseologie und Parömiologie – Neue Perspektiven in der Forschung“, Monte Verità, Ascona/Schweiz). En: *Interlinguistische Informationen (IntI)* 10, Nr. 40 (3/2001): 13-14.
- (2001c): *The EU and the Irish Language: Identity and Linguistic Diversity*. An Chéad Cló, 46 p. En: *Informilo por Interlingvistoj (IpI)* 14, Nr. 44 (1/03): 16-17.
- (2001c): „Kolokvo pri plurlingveco en Innsbruck“ (35. Internationales Linguistisches Kolloquium, Innsbruck). En: *Informilo por Interlingvistoj (IpI)* 10, Nr. 38 (3/01): 2.
- (2001d): „Internacia Konferenco pri Frazologio en Ascona“ (Workshop „Phraseologie und Parömiologie – Neue Perspektiven in der Forschung“, Monte Verità, Ascona/Schweiz). En: *Informilo por Interlingvistoj (IpI)* 10, Nr. 38 (3/01): 4-5..
- (2003a): „Esperanto auf dem AILA-Kongress in Singapur“. (13. Weltkongress der Association Internationale de Linguistique Appliquée, Singapur). En: *Interlinguistische Informationen (IntI)* 12, Nr. 46 (1/2003): 4.
- (2003b): „Esperanto en AILA-kongreso en Singapuro“ (13. Weltkongress der Association Internationale de Linguistique Appliquée, Singapur). En: *Informilo por Interlingvistoj (IpI)* 12, Nr. 44 (1/03): 2.
- (2003c): REC pri Ed Borsboom „Vivo de Andreo Cseh“. En: *La Gazeto* Nr. 106 (2003) p. 26.
- (2003d): REC pri Klaus Schubert (ed.) „Planned Languages: From Concept to Reality“. En: *Language Problems and Language Planning* 1/2003 p. 102-106.
- (2005a): „Die EU und die irische Sprache“. REC pri Seán Ó Riain (2001): *The EU and the Irish Language: Identity and Linguistics Diversity*. An Chéad Cló, 46 p. En: *Interlinguistische Informationen (IntI)* 14, Nr. 55-56 (2-3/2005): 13-15.
- (2005b): „Pri la eŭropa lingvo-problemo vidpunkte de irlanda diplomato“. REC pri Seán Ó Riain
- (2005c): „Eigennamen in der Arbeitswelt“. REC pri Rosemarie Gläser (2005): *Eigennamen in der Arbeitswelt (Onomastica Lipsiensis – Leipziger Untersuchungen zur Namensforschung Band 3)*. Leipzig: Universitätsverlag, 335. p. En: *Interlinguistische Informationen (IntI)* 14, Nr. 55-56 (2-3/2005): 25-28..
- (2006): „Das Ende von Englisch als Fremdsprache?“ REC pri David Graddol (2006): *English Next. Why Global English May Mean the End of 'English as a Foreign Language'*. London: The British Council, 123 S. En: *Interlinguistische Informationen (IntI)* 15, Nr. 60-61 (3-4/2006): 3-4.
- (2007): „English Next (David Graddol)“. REC pri David Graddol (2006): *English Next. Why Global English May Mean the End of 'English as a Foreign Language'*. London: The British Council, 123 S. En: *Informilo por Interlingvistoj (IpI)* 16, Nr. 60 (1/07): 9.

- (2008a): „Interlinguistik-Modul an der Universität Leipzig“. En: Interlinguistische Informationen (IntI) 17, Nr. 66-67 (1-2/2008): 4-6.
- (2008b): Interlingvistiko/esperantologio kiel fako en universitatoj – spertoj el Leipzig. En: Informilo por Interlingvistoj (IpI) 17, Nr. 65 (2/08) 2-25.
- (2008c): „Interlinguistik an Universitäten – Erfahrungen aus Leipzig“. En: Blanke, Detlev (Red.): Plansprachliche Bibliotheken und Archive. En: Interlinguistische Informationen. Beiheft 15, 121-142.
- (2008d): REC pri Till Dahlenburg „Pli lume la mallumo zumas ...“ Stilfiguroj en la poezio de Esperanto. En: Literatura Foiro Nr. 231 (2008) S.49/50.
- (2008e): Marc Okrand – der Erfinder von Klingonisch in Leipzig. En IntI 68 (3/08), 31-32.

2.4.2 KIMURA Goro Christoph

La japana socilingvisto *d-ro KIMURA Goro Christoph* en aprilo 2007 estis nomumita eksterordinara profesoro pri la germana lingvo kaj socio ĉe la Fakultato por Fremdaj Lingvoj kaj Studoj, Sophia-Universitato Tokio.

Jen la listo de liaj publikaĵoj:

- (1999 kun USUI Hiroyuki): Kotoba e no Kenri [Lingvaj rajtoj], Tokio: Sangensha, 214 p.
- (2001): „Intentionale Eingriffe in den Sprachgebrauch – Perspektiven und Probleme einer umfassenden Theoriebildung. En: Fiedler, Sabine / Liu Haitao (red.): Studien zur Interlinguistik/ Studoj pri Interlingvistiko. Praha: KAVA-PECH, 19-29.
- (2003a): “The metacommunicative ideology of Esperanto: Evidence from Japan and Korea.” En: Language Problems and Language Planning, Vol. 27, No. 1, Spring, 71-83.
- (2003b, kun USUI Hiroyuki): „Eigo no „tikyuuka“ to daitaiteki na gengoteki koukyouken no kanousei“ [La globaliĝo de la angla lingvo kaj ebloj de alternativaj publikaj medioj]. En: Japana Esperantologio, n-ro 2, Japana Esperanto-Instituto, 49-57.
- (2004, kun YAMAMOTO Mayumi kaj USUI Hiroyuki): Gengoteki Kindai wo koete [Transe de la lingva modernio: Kiel oni vivu en multlingva socio?], Tokio: Akashi, 329 p.
- (2005a): Gengoseisaku kenkyuu no Gengokan wo tou [Kion esploristoj de lingvoj komprenas je la nocio lingvo? Kelkaj diferencoj inter „lingvoplanado“ kaj „lingva manaĝerado“]. En: Gengoseisaku [Lingvopolitiko] Nr. 1, Gengoseisakugakkai [Japana Societo pri Lingvopolitiko], 1-13.
- (2005b): “Doitu no gengohou” [Lingvaj rajtoj en Germanio]. In: Ousyuu syokoku no gengohou [Sprachenrecht in Eŭropa], Tokio: Sangensha, 299-319.
- (2005c): Gengo ni totte “Zin'isei” towa nanika ? [Kiun rolon ludas intenco: lingvo-kreado kaj lingvaj ideologioj prezentitaj ĉe la ekzemplo de la soraba kaj korna lingvoj], Tokio: Sangensha, 608 p.
- (2005d): „Pri la rolo de la germana kaj japana lingvoj en scienco en Tokio“. En: Informilo por Interlingvistoj (IpI), 14, Nr. 55 (4/05): 24.
- (2006): “Kyousei e no siten tositenno gengoken” [Kiel lingvaj rajtoj akcelas la kunvivadon]. En: “Kyousei” no naizitu [Kion signifas „kunvivado“?], Tokio: Sangensha, 11-27.
- (2007): “Gengo ni okeru sizen to zin'i [„Natureco“ kaj „artefariteco“ ĉe lingvoj – Kial ĉi-tiu dualismo ne utilas al socilingvistiko]. En: Kotoba to Syakai [Lingvo kaj socio], Nr. 10, Tokio: Sangensha, 120-135.
- (2008a): „Yooroppa zigen ni okeru gengokenhosyou no toutatuten to kadai“ [Atingoj kaj taskoj ĉe lingvaj rajtoj en Eŭropo]. In: Gengo [Lingvo], Februaro, 26-33.
- (2008b, eld. kun YOSHIDA Naoko): Azia ni okeru kousei na gengoseisaku nimukete – daigokai nitobe simpoziumu kirokusyu / Al justa lingvopolitiko en Azio - Aktoj de la 5a Nitobe-

2.4.3 Velimir Piškorec

2.4.3.1 Biografiaj notoj

Dr. sc. Velimir Piškorec naskiĝis la 3-an de marto 1966 en Đurđevac (Nordkroatio), kie li finis elementlernejon. Mezlernejon vizitis en Đurđevac kaj Bjelovar. De 1986 ĝis 1993 studis germanan kaj anglan lingvojn kaj literaturojn ĉe la Filozofia fakultato en Zagreb. Dum la universitataj studoj li laboris kiel ĉiĉerono, mezlerneja instruisto kaj tradukisto. En 1996 li finis postdiplomajn studojn pri lingvistiko magistriĝante kaj en 2001 doktoriĝis pri germanaj pruntvortoj en kroata *kajkava* dialekto en la regiono Podravina. Ekde 1993 li laboras ĉe la Filozofia fakultato; unue kiel scienca novico ĉe Instituto pri lingvistiko kaj ekde 1994 ĉe la Germana fako (de 1994 ĝis 2003 asistanto, de 2003 ĝis 2007 docento, ekde 2007 eksterordinara profesoro pri germana lingvistiko). De 2004 ĝis 2005 li estis estro de la Germana fako kaj kunordiganto de la kompilado de reformita studprogramo de germanaj studoj ĉe Filozofia fakultato.

Li publikigis inter alie studojn pri german-kroata lingvokontakto, germana ortografia reformo, dialekta dulingveco, kroata lingvopolitiko, lingvaj biografioj de kroataj laborantoj migrantoj en Germanio, diskursa analizo, interlingvistiko (historio de E-o gazetaro, Esperanto kiel parto de lingva aŭtobiografio). Kroatigis fakajn tekstojn pri lingva imperiismo kaj ekolingvistiko. Okupiĝas ankaŭ pri scienca valorigo de kajkava loka dialekto kaj Esperanto kaj ilia publika prezento en gazetaro kaj elektronikaj medioj.

Li estas membro de kelkaj landaj kaj internaciaj fakaj kaj sciencaj organizaĵoj: 1. Hrvatsko društvo za primijenjenu lingvistiku (Kroata Asocio pri Aplikita Lingvistiko), 2. Hrvatsko filološko društvo (Kroata Filologia Asocio), 3. Društvo hrvatskih književnih prevoditelja (Kroata Asocio de Literaturtradukistoj), 4. Kajkavsko spravišće (Kajkava Unuiĝo), 5. Universala Esperanto Asocio, 6. Internationale Vereinigung für Germanistik, 7. Österreichische Gesellschaft für Germanistik, 8. Gesellschaft für Interlinguistik, 9. Hrvatski savez za esperanto (Kroata Esperanto-Ligo).

1994/1995 li estis gvidanto de Zagreba Lingvista Rondo. De 1996 li estas redakciano de la faka gazeto pri didaktiko de fremdlingvoj *Strani jezici*, 1994-1996 sekretario, 2004-2005 vicedaktoro kaj nuntempe redakciano de la faka lingvistika revuo *Suvremena lingvistika* (Nuntempa lingvistiko). Ekde 2007 li estas redakciano de la gazeto de Zagrebaj esperantistoj *Zagreba Esperantisto*. Li estas kunlaboranto de Kroata Enciklopedio.

Li estis ankaŭ membro de kelkaj komisionoj ĉe la Kroata Ministerio pri Scienco kaj Edukado (aprobado de germanlingvaj lernolibroj por kroataj lernejoj, recenzado de aplikoj por stipendioj). Li estas membro de la eldona komisiono de la eldonejo FF-press ĉe la Filozofia fakultato en Zagrebo.

Li esperantistiĝis kiel elementlernejano en 1978 en la loka klubo «Koko» en Đurđevac kaj aktivis en la movado dum la 1980-aj jaroj. Dum tiu periodo li estis membro de la prezidantaro de Kroata Esperanto-Ligo. Li ricevis honoran mencion en la Belartaj konkursoj en la jaro 1987 pro originala prozo («Viveroj»). Li estis distingita de Jugoslavia Esperanto-Ligo. Reaktiviĝis en la landa movado post la jaro 2000. Dum la UK en Zagrebo en 2001 li estis vicrektoro de la Kongresa universitato kaj kunlaboris en kultura programo.

En la akademia jaro 2007/2008 li gvidis seminarion pri eko- kaj interlingvistiko por studentoj de la germana fako. Por la prelegprogramo de Filozofia fakultato en akademia jaro 2008/2009 li proponis du nedevigajn, libere elekteblajn studobjektojn pri interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto – kiuj intertempe estis aprobitaj de la Germana fako kaj nun estas aprobitaj de la fakultata kaj universitata administrantaro.

Li estis kunordiganto pri la programo de kolokvo *Esperanto kaj kroata kultura identeco*, okazinta la 7-an kaj 8-an de novembro 2008 ĉe la Filozofia fakultato en Zagrebo.

2.4.3.2 Publikigaĵoj

(1) Artikoloj

- (2006) Standard između organskoga govora i planskoga jezika – hrvatski standardni, đurđevečki i esperanto /La standardlingvo inter loka dialekto kaj planlingvo – kroata standardlingvo, dialekto de Đurđevac kaj Esperanto/, *Strani jezici* 35 (2006), 1, p. 51-61. /lingva autobiografio/
- (2006) *Naĝu, naĝu, ŝipo mia* – prvi hrvatski esperantski časopis *Kroata Esperantisto* (1909.-1911.) /La unua kroata Esperanto-gazeto *Kroata Esperantisto*/. En: J. Granić (red.): *Jezik i mediji – jedan jezik, više svjetova* /Lingvo kaj medioj – unu lingvo, pluraj mondoj/. Zagreb – Split: Hrvatsko društvo za primijenjenu lingvistiku /Kroata Asocio pri Aplikita Lingvistiko/, 2006, p. 563-574.
- (2006) Pri vivo kaj verkado de Mavro Špicer (1862-1936). *Tempo – Gazeto de Kroata Esperanto-ligo*, decembro 2006, p. 4-5.
- (2007) Iz života i djela Mavra Špicera /Pri vivo kaj verkado de Mavro Špicer/ (1862.-1936.). *Našički zbornik* 8, red. Silvija Lučevnjak. Našice: Ogranak Matice hrvatske Našice, 2007, p. 145-210.

(2) Raportoj

- (2003) Esperantisti o jezičnim pravima i odgovornostima: Svjetski esperantski kongres, Göteborg, 26. srpnja – 2. kolovoza 2003. /Esperantistoj pri lingvaj rajtoj kaj respondecoj, UEA-kongreso/. *Strani jezici* 32 (2003), 4, p. 279-284.
Kurso pri ekolingvistiko kaj interlingvistiko ĉe Filozofia fakultato en Zagrebo. *Zagreba Esperantisto*, 2008/1, p. 9

(3) Recenzoj

- (2006) REC pri Romano *Adolesko* de Blazio Vaha. *Tempo*, XXV/2006, 2, str. 10.
- (2006) REC pri Detlev Blanke: *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. Herausgegeben von Sabine Fiedler. *Suvremena lingvistika* 62 (2006), p. 270-279.

(4) Traduko

- (1998) Robert Phillipson: Teorijske osnove jezičnoga imperijalizma /Teoria bazo de lingva imperiismo/. *Strani jezici* 3-4 (1998), str. 168-193. (parto de la libro de R. Phillipson: *Linguistic Imperialism*).

2.4.4 Wim Jansen

Ni informis en IPI 63 (4/07) kaj en „Interlinguistische Informationen“ (IntI) 65 (3-4/07), p. 18 kaj Nr. 66-67 (1-2/08), p 8-10 pri la doktoriĝo de la nederlanda sciencisto *Wim Jansen* kaj publikigis la liston de liaj verkoj. Fine de 2008 d-ro Jansen estis nomumita profesoro pri Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la universitato de Amsterdam. Antaŭ nelonge aperis resumo de lia disertacio ankaŭ en Esperanto:

Jansen, Wim (2008) : Naturaj vortordoj en Esperanto. Rotterdam: UEA, 40 p. ISBN 978-92-9017-103-4.

2.5 Kursoj

2.5.1 Kursoj en Stokholmo

Ni ĝenerale ne publikigas informojn pri Esperanto-kursoj. Tio estas tasko por ILEI. Tamen, se universitataj Esperanto-kursoj estas ligitaj kun interlingvistikaj prelegoj, kiel en la suba kazo, tiam ni volonte informos.- Red.

Somere 2008 finiĝis la Esperanto-kurso de la Stokholma universitato. Entute estis kvar subkursoj:

1. "Enkonduko al Esperanto" (7,5 p) - instruis *Sonja* kaj *Hokan Lundberg*
2. "Interlingvistiko kaj konstruitaj lingvoj" (7,5 p) - instruis *Hartmut Traunmüller*
3. "Profundigo en Esperanto" (11 p) - instruis *Sonja*
4. "Pri la kulturo kaj movado de Esperanto" (4 p) - instruis/gvidis *Sonja*

Jen kelkaj mallongaj informoj pri la kurso:

- El la 30 interesiĝantoj/aliĝintoj efektive nur 23 enskribiĝis (iuj forfalis pro tempomanko, aliaj pro mankantaj notoj).
- El la 23 studentoj kiuj enskribiĝis 13 sukcese trairis kaj la skriban kaj buŝan ekzamenojn de la enkonduka kurso.
- Jen priskribo de la enkonduka kurso en la sveda: <http://ikso.net/tmp/su/kursbeskrivning.doc> .
- La enkonduka kurso estis sendepende de la aliaj elektebla kaj sekvebla, kaj parto de la studentoj aliĝis nur al ĝi.
- La duan subkurson trairis 6 studentoj farante skriban ekzamenon.
- Tiuj 6 dum tiu ĉi semestro trairis la trian kaj kvaran subkurson.
- Fine de la tria subkurso la studentoj faris B1- kaj B2-nivelajn ekzamenojn de ILEI, ĉiuj sukcese.
- Dum la kvara subkurso la studentoj laboris memstare kaj verkis mallongajn laboraĵojn:

Ili troveblas jene:

http://ikso.net/tmp/su/Esperantokulturo_en_la_reto.doc

http://ikso.net/tmp/su/Muziki_en_Esperanto.doc

http://ikso.net/tmp/su/Slango_universala.pdf

http://ikso.net/tmp/su/Esperanto_en_universitatoj.doc

Ĝenerale ni kontentas pri la kurso. La kombino de ĉeesta instruado, i.a. per ekzercoj/taskoj el www.edukado.net, malĉeesta instruado per <http://de.lernu.net> kaj ekzamenado per MONDO (<http://mondo.su.se>) kaj buŝa ekzameno montriĝis tre bona. Laŭplane la kurso okazos denove en 2009 se sufiĉe multaj aliĝos al ĝi.

Informas: *Sonja* kaj *Hokan Lundberg* (hokan@ikso.net)

2.5.2 En germanaj universitatoj

Prof. Sabine Fiedler, okaze de gastprofesora restado ĉe la **Universitato Erfurt** kaj kadre de la magistra kleriga unuo „lingvoscienco“ dum la vintra semestro 2008/2009 prezentas seminarion pri "Language Policy" (lingva politiko), en kiu ŝi traktas aktualajn problemojn de la internacia komunikado, kiuj rezultas el la hegemonia rolo de la angla. Ŝi diskutigas la studentojn, kiel oni povus fari la internacian komunikadon pli samrajta kaj prezentas la modelojn de multlingvismo, la EuroCom-modelon, la anglan kiel lingua franca, la uzon de planlingvo kaj ekonomiajn aspektojn.

Ĉe la nordgermana **Universitato Greifswald** en la instituto pri slavaj lingvoj dum la vintra semestro 2008/09 *d-rino habil. Cornelia Mannewitz* prezentas seminarion pri la temo "Artefaritaj lingvoj – artefaritaj mondoj“. Ŝi traktas la ligojn inter lingvaj kaj sociaj utopioj en la literaturo kaj aparte traktas slavajn projektojn inter la konstruitaj lingvoj ("conlanging"). La studentoj devas pretigi laboraĵojn por ricevi poentojn.

Dum la vintra semestro 2008/09 *doc. d-ro d-ro Rudolf-J. Fischer* ĉe la **Universitato Münster** prezentas kurson „Esperanto por ĉiufakultataj studentoj“. La instruoferto estas parto de la instituto pri ĝenerala lingvistiko kaj aparte celas bakalaŭrajn studentojn. Ili ricevas poentojn. Oni planas daŭrigi la kurson dum la somera semestro 2009 ĝis la nivelo B1-B2. Kiel bone uzebla por studentoj montriĝas la instrumaterialo de d-ro Fischer (vidu <http://www.esperanto.de/lehrbuch>).

2.6 Disertacioj kaj aliaj altlernejaj laboraĵoj

2.6.1 Bakalaŭraj kaj magistras disertacioj

Votýpkova, Eliška en la Silezia Universitato de Opava la 18-an de septembro 2007 defendis bakalaŭran studfinan laboraĵon pri la temo “Esperanto en Opava 1945-1965 (en la ĉeĥa lingvo), 55 p. (Laŭ la organo de ĈEA, Starto 4/2007, p. 114.)

Magistras disertacioj:

Chmielik, Tomasz Stanisław (2008): Media elektroniczne w języku esperanto (Elektronikaj amaskomunikiloj en la lingvo Esperanto). Lublin: Universitato de Maria Curie-Skłodowska (UMCS), (recenzis prof. dr Włodzimierz MICH), 93 p.

Lambers, Victoria (2008): La langue comme facteur d'identité et son interaction avec la politique: le cas de la communauté espérantiste de La Calamine. Bruxelles: Université libre de Bruxelles. Faculté des Sciences Sociales, Politiques et Economiques. Département de sciences sociales. Année académique 2007-2008. Directeur: M. Pierre Petit, 123 p. + 10 aldonoj.

Resumo de la tabel-enhavo

L'espéranto et sa prononciation

Introduction

Partie I : L'histoire dans la construction identitaire de la calamine

A : Historique

B : Élaboration de la recherche et mes premiers pas sur le “terrain”

C : Éléments principaux du savoir historique à La Calamine

Partie II: L'esperanto et ses diverses facettes.

A : Présentation historique et thématique

B : L'élaboration de la recherche

C : Résultats de la recherche : Le groupe de Senlime

Conclusion : Pour un nouveau départ

1 L'histoire à La Calamine

2 Le groupe de Senlime

3 L'esperanto dans le monde

Poller, Bendikt (2008): Zur Rolle von Plansprachen in der internationalen Kommunikation. Die Kulturgebundenheit des Esperanto – eine soziologische Untersuchung. München: Ludwig-Maximilian-Universität München, Institut für Deutsch als Fremdsprache. Fakultät 13, Dep. II, Kommunikation und Sprachen. 103 p. + 38 p. aldonoj. (Ekspertizis prof. Dr. J. Roche, prof. W. van Peer).

2.6.2 Doktorigaj disertacioj

Gagliardi, Giulia (2008): Giuseppe Peano e *il Latino sine flexione*. Un matematico alla ricerca di una lingua per la comunicazione internazionale. Anno Accademico 2007-2008. Relatore: Prof. Fabrizio A. Pennacchietti. 555 p.

Nicolas, Isabelle (2007): De l'espérantologie nouvelle à travers les histoires de vie: d'une institutionnalisation associative à une institutionnalisation académique grâce aux dispositifs de l'autogestion et des techniques FREINET. Paris: Université Paris VIII-Vincennes-Saint Denis. Ecole Doctorale „Vivant et société“. Ekspertizis Rémi Hess, Gabrielle Weigand, Eliana Abraham-Ramirez, Jean-Claude Lescure), 405 p.

3 Novaj eldonaĵoj

3.1 Katalogo II de la kolekto Károly Fajsz

Kun subteno de Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Hungaria Esperanto-Asoci en 2008 finfine povis aperi la dua parto de la libro-katalogo de la Kolekto Károly Fajsz, kiu jam en 2005 estis preta kiel manuskripto. La kolekto Fajsz estas parto de la hungara ŝtata Fremdlanda Biblioteko Budapeŝto. Ni prezentos ambaŭ partojn:

Pataki-Czeller, Mária (1991, Red.): Katalogo de la Esperanto-Kolektaĵo de Károly Fajsz. Budapest. Libroj. Parto I. Budapest: Országos Idegennyelvű Könyvtár, 542 S.

Zsebeházy, György (2005, Red.): Katalogo de la Esperanto-Kolektaĵo de Károly Fajsz Budapest. Libroj. Parto II. Budapest: Országos Idegennyelvű Könyvtár, 506 S.

3.2 Poŝvortaroj el Poznań

En la eldonejo Prodruck (Poznań) aperis kelkaj t.n. kelklingvaj „etvortaroj“ sub redakto de d-ino *Ilona Koutny*:

Koutny, Ilona (2002): Education & Work. Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lernado kaj Laboro. Tanulás és Munka. Poznań: Prodruck, 143 p.

Koutny, Ilona (2003): *Language & Communication. Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado. Nyelv és Kommunikáció.* Poznań: Prodruck, 122 p.

Koutny, Ilona (2005): *Human Life & Housing. Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Homa vivo kaj Loĝado. Az emberi élet és Lakás.* Poznań: Prodruck, 156 p.

Koutny, Ilona/ Čižikaitė, Aida (2005): *Angla-Esperanta-litova etvortaro pri lernado kaj laboro.* Poznań: Prodruck / Kaunas: Lietuvos esperantininkų sąjunga, 143 p.

Koutny, Ilona/ Brosch, Cyril/ Jaskot, Maciej / Vogt, Horst (2008): *Sprache und Kommunikation. Germana-Esperanta-Pola etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado. Język i Komunikacja.* Poznań: Prodruck, 138 p.

3.3 Aktoj de Esperantologiaj Konferencoj

Dum la lastaj jaroj eblis dokumenti la enhavon de la tradiciaj esperantologiaj konferencoj per aperigo de la aktoj. Ĝis nun aperis:

Blanke, Detlev (2001, Red.): *Esperanto kaj kulturo- sociaj kaj lingvaj aspektoj. Aktoj de la 19-a Esperantologia Konferenco en la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, Prago 1996.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 50 p.

Blanke, Detlev (2007, Red.): *Lingvaj kaj historiaj analizoj. Aktoj de la 28-a Esperantologia Konferenco en la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, Vilno 2005.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 92 p.

Wennergren, Bertilo (2007, Red.): *Esperanto kaj la Interreto. Aktoj de la 29-a Esperantologia Konferenco en la 91-a Universala Kongreso de Esperanto, Florenco 2006.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 65 p.

Lins, Ulrich (2008, Red.): *Aziaj kontribuoj al esperantologio. Aktoj de la 30-a Esperantologia Konferenco en la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, Jokohamo 2007.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 61 p.

La aktoj de la 31-a konferenco (Roterdamo 2008) aperos en 2009.

3.4 Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto

Antaŭ nelonge aperis la unua granda superrigardo pri la originala literaturo de Esperanto. (Vidu ankaŭ la prienhavan informon en IpI 66, p. 27-28). Ke la verkego aperis en la angla, estas tre bonvene, ĉar tiel la neesperantista publiko povus pli facile kompreni, ke Esperanto havas sian propran kulturon, kies grava elemento estas la originala verkado. Gratulon meritas la verkinto kaj la eldonisto *Ulrich Becker*. *Geoffrey Sutton* prezentas en sia vere monumenta eldonaĵo verkojn de pli ol 300 aŭtoroj.

Sutton, Geoffrey (2007): *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto.* New York: Mondial, 728 p.

Jen la enhavo:

- Acknowledgements / Agnoskoj
- Abbreviations
- Preface *by Humphrey Tonkin*
- Recommendation / Rekomendo *by Mauro Nervi*

General Introduction.

The Original Literature of Esperanto 1887-2007 with biographies, dates, descriptions of work and concise bibliographies in chronological order

The First Period 1887-1920

Primitive Romanticism and the Establishment of Style

The Second Period 1921-30

Mature Romanticism and a Literary Flowering

The Third Period 1931-51

Parnassianism and the Coming of Age

The Fourth Period 1952-74

Post-Parnassianism and Modernism

The Fifth Period 1975-

Popularization of the Novel, Experimental Poetry, Postmodernism

Outline of Esperanto's Linguistic Structure and Creative Capabilities

Esperanto from the Viewpoint of a Writer (extract) by Claude Piron

The Structure of Esperanto

Pronunciation

Grammar

Specimen Literary Texts

Vocabulary to the Specimen Literary Texts

Bibliographies

General Bibliography, including sources

Cited Translations from Original Esperanto Literature

Appendices

Esperanto Culture - summary

Associated Reference Works in literature, linguistics and allied disciplines

Libraries and further information

Index

3.5 Libroj pri la historio de Universala Esperanto-Asocio

En la jaro 2008 Universala Esperanto-Asocio ekzistas 100 jarojn. Pro tio ni atentigas pri kelkaj verkoj lastatempe aperintaj:

Sikosek, Marcus (2006): Die neutrale Sprache. Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes. Bydgoszcz: Skonpres, 2006. ISBN 978-83-89962-03-4. 459 paĝoj, ill. (Kp. IntI 60-61, p. 25-26.)

Van Dijk, Ziko (2008): La Asocio. Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 304 p.

Lins, Ulrich (2008): Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 126 S.

Nove eldonita kaj prinotita de Ulrich Lins aperis la klasika biografio de Zamenhof:

Privat, Edmond (2007): Vivo de Zamenhof. Sesa eldono. Redaktis Ulrich Lins. Rotterdam:UEA, 171 p.

3.6 Planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj - 15-a eldono de la Aktoj de GIL

Kiel ni informis en IpI 63 (4/07) en la jaroj 2007 kaj 2008 okazis du gravaj konferencoj pri planlingvaj arkivoj kaj bibliotekoj. La unua estis esperantlingva kaj okazis la 19-an kaj 20-an de oktobro 2007 en Vieno. La aktoj aperos en 2009 ĉe UEA.

La dua aranĝo, sed ĉi-foje germanlingva, estis la 17-a konferenco de Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik), 23.-25.11.2007 en Berlin. La aktoj enhavas ankaŭ tekstojn de *Jiří Proskovec* kaj *Ziko Van Dijk*, kiuj ne povis partopreni la konferencon.

La aktoj aperis:

Blanke, Detlev (2008, Red.): *Plansprachliche Bibliotheken und Archive. Beiträge der 17. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23.-25. November 2007, Berlin. En: Interlinguistische Informationen. Beiheft 15. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 157 p.*

Jen la enhavo

<i>Detlev Blanke (DE)</i>	Problemoj de planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj
<i>Herbert Mayer (AT)</i>	Tradiciaj bibliotekoj – novaj defioj (La Kolekto Planlingvoj en la Aŭstria Nacia Biblioteko)
<i>Grit Ulrich (DE)</i>	La „Fondaĵo arkivo de partioj kaj amasorganizoj de GDR en la Federacia Arkivo de Germanio“ kaj la tieaj materialoj pri Esperanto
<i>Fritz Wollenberg (DE)</i>	Planlingvoj en la Arkivo de la Berlin-Brandenburgia Akademio de Sciencoj
<i>Jiří Proskovec (CZ/DE)</i>	La Fritz-Hüser-Instituto kaj ĝia Esperanto-kolekto
<i>Van Dijk, Ziko (DE/NL)</i>	La Hector-Hodler-Biblioteko 1908-2008 – simbiozo de asocia kaj faka biblioteko
<i>Bernhard Pabst (DE)</i>	La privata Esperanto-arkivo de Gustav Kühlmann (Kopenhago)
<i>Marek Blahuš (CZ)</i>	Propono por kreo de superkatalogo kaj cifereca arkivo de la Esperanto-literaturo en la reto

Oni krome prezentis jenajn prelegojn:

Erich-Dieter Krause (DE) Problemoj de esperanta leksikografio por la germana sub aparta konsidero de la grandaj vortaroj

Rudolf-Josef Fischer (DE) La nomoj de la germanaj federaciaj landoj en Esperanto

Sabine Fiedler (DE) Interlingvistiko en universitatoj – spertoj el Leipzig

Cornelia Mannewitz (DE) Lingvo kaj komunikado – spertoj lige al la G8-pinta konferenco en Heiligendamm (Germanio)

4 Language Problems & Language Planning (LPLP)

Ni informas pri la enhavo de la kajeroj de LPLP 2008 (la tria ankoraŭ ne aperis ĉe redaktofino):

4.1 Vol. 32, No. 1, Spring 2008

Language politics and legitimation crisis in Sweden: A Habermasian approach [La politiko de lingvoj kaj legitimiga krizo en Svedio: Aliro laŭ Habermas] (*Tommaso M. Milani and Sally Johnson*)

Langue et droit: Le droit à la langue en contexte de diglossie français-kirundi au Burundi [Lingvo kaj juro: La rajto al patrina lingvo en diglosia kunteksto franca-kirundia en Burundio] (*Jean Baptiste Bigirimana*)

Esperanto as language and idea in China and Japan [Esperanto kiel lingvo kaj ideo en Ĉinio kaj Japanio] (*Ulrich Lins*)

+ 14 recenzoj (inkluzive de Humphrey Tonkin pri Josip Pleadin, *Ordeno de verda plumo*; Klaus Schubert pri Detlev Blanke, *Interlinguistische Beiträge: Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*; Davide Astori pri Marcus Sikosek, *Die neutrale Sprache: Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes*)

4.2 Vol. 32, No. 2, Summer 2008

Marco historico, base lingüística y recursos textuales para la investigación del español del suroeste [La hispana lingvo en sudokcidenta Usono: Historia kadro, lingva fundamento kaj tekstaj rimedoj] (*Francisco A. Marcos-Marín*)

From liturgy to technology: Modernizing the languages of Africa [De liturgio al teknologio: Modernigi la lingvojn de Afriko] (*Paulin G. Djité*)

Language and identity in East Timor: The discourses of nation building [Lingvo kaj identeco en Orienta Timoro: La diskursoj de naciokonstruado] (*Kerry Taylor-Leech*)

Interlinguistics and Esperanto studies in the social context of modern Japan [Interlingvistiko kaj esperantologio en la socia kunteksto de moderna Japanio] (*Usui Hiroyuki*)

+ 4 recenzoj (inkluzive de Humphrey Tonkin pri Edmond Privat (red. Lins), *Vivo de Zamenhof*)

Anglalingvaj resumoj troviĝas ĉe:

http://www.benjamins.com/cgi-bin/t_seriesview.cgi?series=LPLP

Ĉiun artikolon akompanas esperantlingva resumo.

4.3 Malnovaj kajeroj de LPLP senpage haveblaj

Malnovaj numeroj de LPLP haveblaj senpage ĉe Humphrey Tonkin. Manke de alia indiko, ĉiuj artikoloj estas en la angla lingvo, sed ĉiam kun Esperanto-resumo.

1979: vol. 3/1 (*Van Eerde* pri Bretonio, *Geoffrey Sutton* pri fremdlingva edukado en Svedio, *Fellmann* pri lingva evoluigo en la Tigrinija [Eritreo kaj Etiopio], plus recenzoj).

1980: 4/2 (*Foster* pri haitiaj infanoj en Usono, *Gold* pri jida lingvoplanado, *Hefferman* pri franclingva instruado en Kanado [artikolo en la franca], *Joseph* pri lingva klasifo en Italio, *Tollefson* pri lingvoplanado en Jugoslavio, plus recenzoj).

1982: 6/1 (*Sotiropoulos* pri greka diglosio, *Thomas* pri leksikaj varioj en Bosnio, *Thompson* pri la desereta alfabeto en okcidenta Usono, plus recenzoj).

1983: 7/2 (*Hocevar* pri lingva ekonomiko [artikolo en la franca], *Reagan* pri lingvoplanaj implicoj pri lingva ekonomiko, *Vaillancourt* pri la ekonomiko de lingvo kaj lingvoplanado, plus recenzoj).

1983: 7/3 (*Lipski* pri hispanlingva elparolo [artikolo en la hispana], *Nahir* pri revivigo de la hebrea, *Verloren van Themaat* pri kreemo en denaskaj kaj nedenaskaj lingvoj, *Byron* pri lingvo kaj seksismo en la angla, plus recenzoj).

1986: 10/2 (*Valdman* pri oficialigo de haitia kreolo [artikolo en la franca], *Nicholson* pri kortuma interpretado en Usono, *Stieblich* pri akomodigho en dulingvismo, *Tollefson* pri lingva politiko kaj maldekstrismo en Filipinoj, plus recenzoj).

1986: 10/3 (*Penalosa* pri trilingvismo inter majaoj en Losangheleso, *Nyunda ya Rubango* pri la franca en Zairio [artikolo en la franca], *Gruenais* pri la irlanda angla, *Reagan* pri gestolingvoj, plus recenzoj)

1987: 11/1 (Speciala numero pri lingva malegaleco, red. *Jonathan Pool: Pool* pri lingva diskriminacio, *Castonguay* pri angligo en Kanado, *Lacroix* kaj *Vaillancourt* pri lingvokapabloj kaj ekonomio, *Sonntag* kaj *Pool* pri usonaj lingvaj ideologioj, *Schiffman* pri germanlingvaj usonanoj, *Rogers* pri lingva politiko kaj soveta eldonado, *Jordan* pri Esperanto k esperantismo)

1987: 11/2 (*Laitin* pri lingvaj konfliktoj en Katalunio, *Daoust* pri planita lingvoshanghigho kaj leksika vario, *Hidalgo* pri meksika k chikana hispana [artikolo en la hispana], *Reagan* pri lingvoreformo, plus recenzoj)

1987: 11/3 (Speciala numero okaze de la centjarigho de Esperanto:

Tonkin pri la nuna stato de Esperanto, *Edwards* k *McPherson* pri publikaj vidpunktoj pri planlingvoj, *Dasgupta* pri la rilato inter socilingvistiko k Esperanto-kulturo, *Baur* pri svisgermana diglosio, *Barbin* pri la ajmara, *Mullarney* pri la latina, *Golden* pri la heredajho de Volapuko, plus recenzoj)

plus pluraj unuopaj duoblaĵoj de aliaj numeroj.

Petu ĉe tonkin@hartford.edu

Humphrey Tonkin

President Emeritus and University Professor of Humanities, University of Hartford,
West Hartford, CT 06117, USA, Tel. +1 860 768 4448, Fax +1 860 768 4411
Private: 279 Ridgewood Road, West Hartford, CT 06107, Tel. +1 860 561 2669
Fax +1 860 561 5219

5 Pri Esperanto en la Bibliografio de MLA

Kiel konate en la lingvistika bibliografio de la usona Modern Language Association (MLA) regule aperas materialoj pri interlingvistiko, Esperanto kaj proksimaj temoj. Kun MLA kunlaboras *Humphrey Tonkin* (ĉefa bibliografo) kaj *Detlev Blanke*, kiuj liveras la koncernajn informojn. Jen sekvas superrigardo pri la lastaj jaroj:

Bibliografio de MLA: Nombro de eroj transdonitaj al MLA; nombro de eroj, kiuj aperis en la sekcio helplingvoj / internaciaj lingvoj, laŭjare 2001-2007.

2007

- Lingvistiko: artikoloj en revuoj 183, libroj kaj artikoloj en libroj 129
- naciaj literaturoj 39
- ĝenerala literaturo 1
- sume 352.
- Aperis en la sekcio Auxiliary Languages, International Languages: 255
- Esperanto okupis 13-an lokon inter la lingvoj reprezentataj en la bibliografio

2006

- Lingvistiko: artikoloj en revuoj 234, libroj kaj artikoloj en libroj 157
- naciaj literaturoj 23
- ĝenerala literaturo 0
- sume 414
- Aperis en la sekcio Auxiliary Languages, International Languages: 282
- Esperanto okupis 12-an lokon inter la lingvoj reprezentataj en la bibliografio

2005

- Lingvistiko: artikoloj en revuoj 231, libroj kaj artikoloj en libroj 136
- naciaj literaturoj 31
- ĝenerala literaturo 6
- sume 404
- Aperis en la sekcio Auxiliary Languages, International Languages: 270
- Esperanto okupis 10-an lokon inter la lingvoj reprezentataj en la bibliografio

2004

- Lingvistiko: artikoloj en revuoj 265, libroj kaj artikoloj en libroj 185
- naciaj literaturoj 30
- ĝenerala literaturo 4
- sume 484
- Aperis en la sekcio Auxiliary Languages, International Languages: 322

2003

- Lingvistiko: artikoloj en revuoj 104, libroj kaj artikoloj en libroj 44
- naciaj literaturoj 33
- ĝenerala literaturo 4
- sume 185
- Aperis en la sekcio Auxiliary Languages, International Languages: 171

2002

- Lingvistiko: artikoloj en revuoj 262, libroj kaj artikoloj en libroj 105
- naciaj literaturoj 21
- ĝenerala literaturo 1
- sume 389.
- Aperis en la sekcio Auxiliary Languages, International Languages: 295

2001

- Lingvistiko: artikoloj en revuoj 194, libroj kaj artikoloj en libroj 217
- naciaj literaturoj 25
- ĝenerala literaturo 3
- sume 439
- Aperis en la sekcio Auxiliary Languages, International Languages: 407

(La superrigardon kunmetis Humphrey Tonkin).

6 Bernard Golden forpasis

La 19-an de oktobro en la aĝo de 82 jaroj forpasis la konata esperantisto kaj dumviva membro de UEA, Bernard Golden. Lin funebras la vidvino Éva Golden kaj la du filoj Dániel Lariko kaj Dávid Alko. Bernard Golden naskiĝis la 23-an de novembro 1925 en Newark, Nov-Jerzejo, Usono.

Li estis arkeologo kaj aŭtoro de pli ol 1.800 artikoloj, recenzoj, beletraĵoj kaj tradukoj en Esperanto. Lia verkado estis tiel abunda, precipe sed ne nur en la esperantologia kampo, ke iutempe oni uzis la neologismon goldeni en la signifo "abunde verki por ĉiaj periodaĵoj".

El liaj beletraj verkoj elstaras la rakontaroj „Hieraŭ - hodiaŭ – morgaŭ“ (1982) kaj „Bestoj kaj homoj“ (1987), la romanetoj „Infero en aŭtuno“ (1993) kaj „Samanoj en la kosmo“ (1994), kaj la teatra volumo „Antaŭ la kulisoj“ (1994).

Li lernis Esperanton en 1946, edziĝis al hungarino kaj ekloĝis en Hungario en 1971. Ankaŭ liaj du filoj scias Esperanton. Bernard Golden estis multjara korespondanto de la internacia magazino *Monato*, ano de la Akademio de Esperanto, estrarano de Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. Li zorgis pri la pli ol mil Esperantaj terminoj en *Dictionarium museologicum*. (1986).

En 1998, koincide kun la alveno de la reta epoko, Bernard Golden publike deklaris verkoĉeson, sed ne kabeis. Ankoraŭ ne ekzistas kompleta bibliografio de lia vasta verkaro.

7 Personaj bibliografioj

7.1 Kompletigoj al Claude Piron

En IpI 65 (2/2008) kaj „Interlinguistische Informationen“ (IntI) n-ro 66-67 (1-2/08), p. 15-20 kaj n-ro 69 (4/08), p. 19 ni publikigis la bibliografion de *Claude Piron*. Intertempe ni ricevis kelkajn kompletigojn. Ni dankas pro informoj al la vidvino *Nicole Piron* kaj al la norvega esperantisto *Douglas Draper*. Jen la kompletigoj:

10 filmoj de/kun Claude Piron spekteblas:

http://www.youtube.com/results?search_query=Claude+Piron&search_type=&aq=f (14.11.2008)

Esperanto:

(2007): Dio, psiĉjo kaj mi. Vieno. IEM, 173 p. (esperantigo de franca titolo, kiu aperis en 2005.)

Franca:

(2005): Dieu, mon psy et moi. Saint-Maurice: Editions St. Augustin.

Norvega:

(1987): Esperanto for skeptikere. Oslo: Norsk Esperanto-Forbund, 28 S. (Traduko de "Réponses à certaines questions sur l'espéranto")

(1985): Myter og virkelighet. Oslo: Norsk Esperanto-Forbund, 5 S. (Traduko de "Kie la mitoj? Kie la realeco?", aperis en "Esperanto" (Rotterdam), 5/1979, S. 87.

Sveda:

(1984); "Man har sagt mig..." Stockholm: Sveda E-Federacio. 4 p.

Nederlanda:

(1985): "Esperanto: je vraagt maar." (Übers. von "Réponses à certaines questions sur l'espéranto"). Antwerpen: Vlaamse Esperantobond, 23 p.

7.2 Michel Duc Goninaz

Michel Duc Goninaz estas unu el la plej gravaj esperantologoj de la nuntemo. Krom tio, ke li ĉefredaktis la komplete prilaboritan eldonon de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto li multe verkis, ĉefe en Esperanto kaj la franca, prelegis, redaktis, eldonis, kunlaboras kun diversaj revuoj, tradukis beletron kaj aktivadas en la Akademio de Esperanto. La 6-an de septembro 2008 li fariĝis 75-jara. Jen kialo, por prezenti lin kaj lian verkaron en IPI.

7.2.1 Konciza profesia biografio de M. Duc Goninaz

Naskita en 6.9.1933 en Parizo

1949-52 Studado en la Pedagogia Seminario ("Ecole Normale d'Instituteurs") de Parizo

1954-59 Studado en la Supera Pedagogia Seminario ("Ecole Normale Supérieure") en Saint-Cloud, apud Parizo, samtempe en Sorbono kaj (dum la jaro 1956-57) en la Moskva Ŝtata Universitato. Diplomoj: licencio pri franclingva filologio kaj beletristiko, licencio pri rusa lingvo

1963 agregacio pri rusa lingvo

1959-67 instruado de la rusa lingvo en mezlernejoj (Pariza regiono)

1967-1996 instruado de la rusa lingvo en la Provenca Universitato (Aix-en-Provence). Instruado de Esperanto en la sama universitato ekde 1970.

Membro de la Akademio de Esperanto ekde 1976

Membro de Franca Esperanto-Instituto (ties prezidanto en 2004-2007)

7.2.2 Bibliografio en aŭ pri Esperanto

Kiel aŭtoro:

1970, 1990, *Vocabulaire espéranto*, Gap-Paris, Ophrys, 128 p.

1974, *Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko*, Liège, SUK. 38 p.

1984, 1989, *La ŝtona gasto*, Laroque-Timbaut, Cercle espérantiste agenais. 24 p.

Kiel ĝenerala gvidanto:

2002, 2005, *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, Paris, SAT, 1268 p.

Kiel redaktoro:

*1984 (kun François Lo Jacomo, Pierre Janton): *Aspects linguistiques, sociolinguistiques et psycholinguistiques de l'Espéranto*. Paris: Cours et Études de linguistiques contrastive et appliquée de Vincennes, 426 p.(?)

1987, *Studoj pri la internacia lingvo/Études sur la langue internationale/Studies on International Language*, Gent, AIMAV, 156 p.

Kiel tradukinto :

1993, Albert Camus, *La Fremdulo* (L'Étranger), Paris, SAT, 142 p.

1997, Arthur Schnitzler, *Songonovelo* (Traumnovelle), Dobřichovice, Kava-Pech, 96 p.

2003, (kun G. Lagrange) Gaston Waringhien, *Alilingvaj erotikaj poeziaĵoj*, La Krom-Kancerkliniko 18, Thaumiers. 32 p.

2006, Raymond Radiguet, *Kun Diablo en la korpo* (Le Diable au corps), Novjorko, Mondial, 140 p.

Ĉefaj artikoloj:

1962, "La Zamenhofa Esperanto, Simpozio pri -ata-ita" (recenzo), *La Nica literatura revuo* 41.

1966, (kun A. Duc Goninaz) "Éléments de géologie en six langues" (recenzo), *Franca Esperantisto* 237. p. 30

1967, "Ortografio kaj fonetiko en Esperanto", *Esperanto*, marto. p. 39-40.

*1967, "Pri la verkaro de Szathmari". *Sennacieca Revuo*, n-ro 95, 40-45.

1970, "Quelques mots sur la structure de l'espéranto", *Espéranto-Actualités* 264

1971, "Langue et idéologie", *Séminaire "Langue et culture"*, Stichting voor internationale kommunikatatie, Amsterdam. 8 p.

1971, "Plena Ilustrita Vortaro" (recenzo), *Sennaciulo* 6. p. 58-59

1972, "Lingvo kaj ŝtato", *Seminario "Lingvo kaj politiko"*, Stichting voor internationale kommunikatatie, Amsterdam. 6 p.

1972, "Pri lingvo kaj ideologio", *Lingvoponto* (Finnlando), Nr. 1, 23-29

1972, "Apolo kaj la problemo de samtempa interpretado", *Esperanto*, dec. p. 201-202.

- 1974, "Les influences slaves en espéranto", *Cahiers de linguistique, d'orientalisme et de slavistique*, 3-4. p. 31-53
- 1974, "E. Bokarev : Esperanta-rusa vortaro" (recenzo), *Esperanto* 826 (okt.). p. 173
- 1976, "La terminoj de alparolo kiel sociolingvistika problemo" (resumo de prelego), *Kongresa libro de la 61-a UK en Ateno*. p. 23
- 1976, "Bazaj problemoj de la analizo de Esperanto", Tišljarić, Zlatko (Red.), *Lingvistika simpozio*, Zagreb, p. 153-170.
- *1976, "Lingvo kaj ideologio", *Heroldo de Esperanto*, Nr. 7, p.3
- *1978 "L'influence des langues slaves sur le système sémantique de l'espéranto". *Revue des Études slaves* (Paris), Vol. 51, p. 71-74.
- *1978, "Pri la influo de la slavaj lingvoj al Esperanto el leksikologia vidpunkto". *Filologo*, n-ro 11, 1-5.
- 1978, "Sociolingvistikaj problemoj en la funkciado de universala lingvo: la ekzemplo de Esperanto", Hermann Behrmann (Red.) *Paderborner Arbeitspapiere*, Paderborn. p. 5-9
- 1979, "Esperanto en perspektivo" (compte-rendu), *Problèmes de politique linguistique*, vol.3, n°1 (7) (= La Monda lingvo-problemo, vol. 9), p.40-45.
- *1989, "Pri la eksperimenta instruado de Esperanto en elementaj lernejoj de Francio kaj franclingva Svislando". Meyer, I. (Red.) *4. Werkstattgespräch Interlinguistik in Wissenschaft und Bildung*. FEO-LL-Papier 57, Paderborn: Universität, 142-145.
- 1981, "La problemoj de la normo en internacia planlingvo (laŭ la ekzemplo de Esperanto)", *Interlingvistiko en scienco kaj klerigo*, Paderborn, p. 19-24
- 1981, "Kio estas 'vorto' en Esperanto?", Lobin, Günther (Red.). *Kommunikation und Kybernetik*, Paderborn, p. 144-152
- 1981, "La pseŭdonima Waringhien", *Esperanto* n°7. p. 121-124
- 1983, "Lingvosciencaj kaj gramatikaj difinoj de Plena Ilustrita Vortaro", *Acta Interlinguistica*, Varsovio, p. 71-75
- 1983, "Les parties du discours en espéranto", *Travaux du Cercle linguistique*, N°1, Aix-en-Provence, p. 61-71
- 1984, "Qu'est-ce que le passif en espéranto?", *Travaux du Cercle linguistique*, N°2, Aix-en-Provence, p. 185-193.
- 1984, "L'espéranto dans son cadre historique et sociolinguistique", *Journée d'étude sur l'espéranto*, Saint-Denis, Université Paris 8, p. 47-54
- 1984, "Lingvosciencaj kaj gramatikaj difinoj de Plena Ilustrita Vortaro", Rokicki, Ryszard (Red.) *Acta Interlinguistica*, Varsovio. p. 71-75
- 1985, "La pseŭdonima Waringhien: G.E. Maŭra kaj G. Peterido Peneter", *Li kaj ni* (red. R. Hauptenthal), Antverpeno-La Laguna, TK, p. 53-65
- 1985, "La problemoj de la normo en Esperanto", *Acta Interlinguistica*, Varsovio, p. 57-65
- 1985, "La socia statuso de Esperanto : tri historiaj teorioj (Zamenhof, Lanti, Lapenna) konfronte al la nuna realo", *Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo*, Varsovio, Pola Esperanto-Asocio, p. 34-41
- 1985, "Rajto je komunikado kaj lingva libereco : ĉu diverĝaj celoj?", *Sennacieca Revuo*. 113. p. 39-44
- 1985, "Pri la influo de la slavaj lingvoj al Esperanto el leksikologia vidpunkto", *Interlingvistiko, Esperantologio* (red. V. Oljanov). Sofio, Bulgara Esperanto-Asocio, p. 77-84
- 1986, "Liberté linguistique et droit à la communication", *Plurilinguisme et communication* (red. F. Lo Jacomo), Paris, SELAF, p. 177-182
- 1987, "Problèmes sémantiques et sociolinguistiques dans l'usage de l'espéranto", *Studoj pri la internacia lingvo* (red. M. Duc Goninaz), Gent, AIMAV, p.139-144
- 1987, "Por kio utilas la Fundamenta Gramatiko?", Geraldo Mattos (Red.): *100-jara Esperanto*, Chapecó, Fonto, p.98-104

- 1987, "Kiel priskribi Esperanton? Problemoj metodologiaj kaj terminologiaj", *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo*, vol. II, La Laguna, p.141-150.
- *1987, "Formiĝo de ideologiaj modeloj pri la rolo de Esperanto". *Kongreslibro, 22-a Jugoslavia Esperanto-Kongreso*, Banja Luka, 19-20.
